Jarkolekto 16 Trimonata N-ro 1, 1986

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

## Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

REDAKTA KOMITATO

Bociort, I. (R)
Carlevaro, T. (CH)
Formizzi, G. (I)
Kiselman, K. (S)
Lins, U. (D)
Ludwig, E. (F)
Maitzen, M. (A)
Mallia, C. (M)
Mizuno, Y. (J)
Szerdahelyi I. (H)
(redaktisto)

**Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout**

**IPR**

**Redaktejo:** Esperanto-fako, Universitato ELTE/BTK H-1364 Budapest, Pf. 107

**Presado:** Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antwerpen

# Enhavo


Redaktistaj notoj . . . . . 1

PEDAGOGIO – Verebély-Ligetiné, A. – *Pledante por sentoj* (I. Szabó) . . . . . 2

PSIKOLINGVISTIKO – Virág A. – *La "du cerboj" de la homo* – (Cs. Lendvay) . . . . . 7

LERNEJA LINGVOPOLITIKO – Formizzi, G. & Bergamaschi, A. – *Kia lernejo en Eŭropo?* . . . . . 16

INSTRUPRAKTIKO – Specimena ekzameno . . . . . 23

RUĜA KRAJONO – *En kiu lando situas Budapest? - La preseja diableto serpentumas* (sz - i) – *Ne Sapel, sed Japelj* (J. Jug) . . . . . 26

AKTUALAĴOJ – *okazintaĵoj – diversaĵoj – informaĵoj – sciindaĵoj* . . . . . 31

*ANONCOJ* . . . . . 37

*LIBROBRETO* . . . . . 39



**Jarkolekto 16** **marto 1986** **N-ro 1, 1986**

«Internacia Pedagogia Revuo» estas sendependa forumo de la tutmonda pedagogaro. Ĝi aperas trifoje jare. La redakta komitato rajtigas sin mallongigi aŭ korekti la manuskriptojn nur laŭ lingvaj vidpunktoj. Manuskriptojn ni ne resendas. Reproduktaĵoj, tradukaĵoj estas permesataj eĉ rekomendataj kune kun fontindiko.


# Redaktistaj notoj

**Kiom da Esperanto-instruantoj estas en la mondo?** Kiom da esperantistaj pedagogoj: universitataj profesoroj, docentoj, mez- kaj bazlernejaj instruistoj, infanĝardenaj vartistinoj k.t.p. estas en la mondo? Ĉu mil? Ĉu dekmil? Ĉu tridekmil? Ĉu kvindekmil? Neniu scias.

**Kiom da membroj havas ILEI?** Jen la preciza statistiko de la financestro: 1983 – 650
1984 – 607
1985 – 533 (stato la 31-an de oktobro)
Kie estas la aliaj?

**Estimataj Kolegoj!** Vi ĉiuj laboregas. Multaj el inter vi tute senpage instruas infanojn kaj plenkreskulojn, en lernejoj kaj kulturdomoj. Vi faras tion oficiale aŭ duonoficiale, ofte neoficiale eĉ kontraŭ la oficiala sinteno. Ĉu vi ne volas, ke ĉie en la mondo Esperanto estu instruebla laŭ la sama kondiĉo kiel kiu ajn fremda lingvo? Ĉu vi kredas, ke eblas realigi tion sen forta, prestiĝa, aŭtoritata organizaĵo, kiu profesie kaj kompetente reprezentas vin, batalas por la realigo de tiuj celoj, por kiuj ankaŭ vi laboregas kaj defendas viajn interesojn? Se ILEI dum tute mallonga tempo ne sukcesos dekobligi (!) sian membraron, se la sekciestroj kaj estroj de fakaj laborkomisionoj ne laboras laŭ konvenaj metodoj kaj moderna stilo — ĉio, kion ni faras estas preskaŭ vana. **Ne pli multe** vi devas labori, ĉar vi multege laboras, **nur pli bone kaj pli**

**kunordigite** kun viaj kolegoj. Tion celas nia Ligo, al tio helpas nia Revuo.

**Bagatelaĵo:** kelkajn malgravajn ŝanĝojn vi mem rimarkas en la revuo. El inter ili ni mencias nur unusolan: ni ne uzas en nia revuo la diversajn antaŭ- kaj post-nomajn titolojn. Ni pardonpetas de tiuj, kiuj ne konsentas pri tiu nia sinteno.

# Pedagogio

## PLEDANTE POR LA SENTOJ

Anna VEREBÉLY Ligetiné

**Estas nuntempe** preskaŭ natura fenomeno, ke la homoj estas anime pli fermitaj ol antaŭe. Multaj infanoj plenkreskiĝas en la ombro de tiaspecaj paroloj: "tio ne koncernas vin", "ni ne havas tempon por okupiĝi pri aliuloj". Kaj ni ne devas longe divenadi serĉante la kialojn de la introvertiteco kaj tiujn de la esprimo "ĉiu vivu por si mem", kiu atestas pri reduktita valoro de la sentoj.

Nia vivritmo rapidiĝis. Inundas nin la torenta informaro ofte deprima. La procezo de urbanizado puŝas nin en pli kaj pli komplikajn situaciojn. La horoj kaj minutoj de la labortagoj, kies semajna nombro estas reduktita de ses al kvin, estas plenŝtopitaj. Kaj eblus vicigi plu la argumentojn kaj kaŭzojn. Evidente, malantaŭ la menciitaj motivoj kaŝas sin ne nur senkonsolaj vivsituacioj. La semajnofinaj du libertagoj estas tre bona afero — se ili estas vere liberaj. Aldone, sekve de la urbanizado, la loĝantara prizorgo sur multaj kampoj estas pli bona ol antaŭe. Nia vivo en la lastaj jardekoj riĉiĝis ankaŭ per multaj novaj travivaĵoj.

Tamen **la negativaj efikoj — resume ili ĉiuj kune — povas kaŭzi ian malriĉiĝon je la sentoj**. Kaj tia griziĝo povas malebligi la multfacetajn travivon kaj prijuĝon de la homa ĉirkaŭaĵo kaj tiujn de la propra



memo. Ĉio ĉi malutile influas la konduton, sintenon kaj povas misformi la personecon. Ŝajnas, kvazaŭ nuntempe ne estus vivbezono flegi intimajn kaj enhavoriĉajn sentojn. Kvazaŭ en la kurantaj jardekoj de la teknika progreso valorus nure nur la raciaj faktoj, nombroj, indikoj, la rapidaj kaj konkretaj solvoj. Aŭ la senselekta kaj kiel eble plej rapida kontentigo de la privataj, personaj interesoj. (La realigo de la bezonoj, bazaj el la vidpunkto de la vivteno — kiel ekzemple: havi loĝejon — evidente estas tute rajtaj intereso kaj pretendo.)

**Ni maltrankvile rimarkas** la signojn de la misformiĝo en la personeco de niaj infanoj kaj gejunuloj. Estas do necedeble, ke kaj la lernejoj, kaj la familioj provu forigi — laŭ siaj ebloj — la danĝeron de tiu misformiĝo. Unu el la maltrankviligaj fenomenoj estas **la kontentigo de la "propraj bezonoj", "propraj interesoj" eĉ se malprofite al aliuloj**, respektive la morala sento, kiu aperas kune kun tio. Tiu ago — kune kun sia sento-enhavo — antaŭe estis nomata **egoismo**, kaj espereble ankoraŭ ne komplete malaperis tiu esprimo el la ĉiutaga lingvouzo. Feliĉe, estu kiel ajn granda la egoismo, tamen ĝi povas realiĝi nur inter baroj, ĉar ĝi puŝiĝas je la strebadoj de la aliuloj. Kaj tiu karambolo havas vunditojn. Por eviti aŭ toleri tiujn interpuŝiĝojn estas bezonataj ne nur **realisma vivkoncepto kaj ekvilibra sentaro**, sed ankaŭ tiaj homaj trajtoj, kiaj estas komprenemo, toleremo kaj empatio. (Ofte eĉ rifuzemo.) Ĉio ĉi estiĝas ne propre de si mem. Estus bone fortigi en nia eduksistemo la evoluigon de la humanaj trajtoj de la socia kunvivado, respektive tiun de la rilataj sentoj.

Alia signo kaj manifestiĝo de la senta misformiĝo en la personeco estas la "*ricevemo*" spertebla en eĉ ne malvasta rondo de la gejunuloj. Tiu sinesprimo enhavas parte malĝustan vidmanieron, parte negativajn moralajn trajtojn kaj sentojn. Tio kontraŭas la kapablon identiĝi kun la aliuloj kaj la senton de reciprokemo. Al tiaj vidmaniero kaj sinteno kutimigas la materiala prizorgo emfazita malavantaĝe al la psika edukado. En la lernejoj estas same oftaj tiuj pedagogiaj situacioj, kiuj instigas la infanojn je pasiva akcepto, ja malofte sin proponas ebloj

disvolvi la personan aktivadon kaj reciproke alfrontigi la personajn pretendojn.

La strebado al reciprokeco en multaj infanoj formiĝas malfacile. Kvankam tiu kapablo devus transformiĝi en kutimon almenaŭ dum la adoleska kaj juna aĝoj. La partopreno en la socia labordivido, la kunvivado kun la familio kaj ĝenerale kun la homoj ne povas preterlasi la gestojn kun la enhavo de "reciprokeco", kiuj ĝis la plenkreska aĝo fariĝas devoj. *Devoj*, kiuj fontas el humanismo.

Inter la signoj de la malriĉiĝo je sentoj oftas la spektakla manifestiĝo de la *emocioj*. Tiaj estas ekzemple la senretena eksplodo de la abrupta kolero, la senkritika prezentado de la agresemo, — ĝenerale la disvastiĝo de la perforto. Preskaŭ sur ĉiuj terenoj de la socia kunvivado ni spertas tiujn emociojn, kiuj unuflanke vekas similajn emociojn en la aliuloj, aliflanke ili efikas seniluziige al la homa digno. Ili aperas ĉefe en la trafiko kaj aĉetado. La menciita sinteno prezentas malutilan "modelon" por la infanoj kaj adoleskuloj. La danĝero estas granda tial, ĉar la gejunuloj supozas iajn malmolecon kaj internajn fortojn en la agresivaj manifestiĝoj, aŭ aliflanke: ili vidas en tiu sinteno unu el la ebloj de la avancado. Ili ne ĉiam malkovras la verajn radikojn de tiuj agoj: *la malhomecon kaj senkulturecon.*

**La malfortiĝo** de la internaj — psikaj — baroj evidentiĝas en la manifestiĝo de *amo*, unu el la plej noblaj sentoj. Obscenaj sentoj sekvas unu la alian senselekte inter la knaboj kaj knabinoj, kiuj videble nur porokaze apartenas unu al la aliaj. Ofte eblas sperti en busoj kaj tramoj tiajn fibuŝajn signojn de "aparteneco unu al la alia". Eble eĉ ne tiuj signoj kaŭzas la ĉefan problemon, (kvankam ili povus kaŭzi tion), sed la ignorado de la gustoj kaj sentoj de la aliaj — volaj-nevolaj — ĉeestantoj. La krudaj manifestiĝoj ofte prenas sur sin la maskon de sincereco. Tamen estas ĝenerale konate, ke ekzistas konvencia limo, trans kiu la — cetere estiminda — sincereco fariĝas ofenda.

La prezentitaj fenomenoj instigas nin starigi pliajn demandojn. Unu



el ili koncernas la *kontaktiĝon*, kaj ties sentobazojn. Ekzistas multspecaj kontaktoj: la plej gravaj estas la familiaj, amikaj, geedzaj kaj kolegaj rilatoj. Ilin saturas la motivoj de la sentoj: amo, seksa sopiro, malŝato, malvolonteco, interna kontraŭemo. Ĉiukaze la plej esenca demando estas tio, kiugrade oni kapablas krei enhavriĉajn, profundajn kaj ĝojplenajn kontaktojn kun aliuloj. Kiugrade oni sentas internajn instigojn por ekhavi pozitivajn kontaktojn, entrepreni, formi, profundigi ilin respondece. Estas vaste konate, ke ilia flegado estas tempopostula. La disvolviĝon ofte malhelpas komplikaj, multfoje malesperigaj okazoj kaj fenomenoj. Tamen, nur tiu kontakto povas esti multpromesa kaj fruktodona, por kies konservado oni dediĉas tempon, energiojn, sentojn, kaj ĉe kiuj ni ne bedaŭras la reciprokecon, do se ni estas kapablaj ankaŭ doni, ne nur ricevi.

Eble la hasta vivritmo de nia epoko kaŭzas, ke nuntempe malmultas la bonetosaj konversaciadoj, amikaj kunestoj, eĉ kunagoj. Inter la gejunuloj pli kaj pli oftas la tielnomataj "ariĝoj" kaj disiĝemaj "amiĉjaj" kontaktoj estiĝintaj por mallongperiodaj celoj (diskoteko, sporto). Tamen, sen riĉenhavaj homaj kunagoj nia vivo fariĝos malkompleta, la ligoj kun la socia komunumo malfiksiĝas kaj la maljunaĝo senhomiĝas.

Neeviteble leviĝas ankaŭ la alia demando: kiajn kulturajn kadrojn serĉas kaj trovas por si nuntempulo por esprimi siajn sentojn al la aliuloj. Ĉu oni preferas la krudajn formojn, aĉajn blasfemojn kaj gestojn tiam, kiam li alfrontas ion aŭ iun? Ĉu li elektas ironiajn kaj emociokaŝajn rimarkojn tiam, kiam oni devus paroli en la tono de estimo kaj honesteco? Ĉu li arogas kaj pozas tiam, kiam la alia homo sopiras amon, eĉ, se eble la partnero volonte prezentus la atenditan karecon, sed li timas, ke tio ne estas "laŭmoda" nuntempe?

**La kulturitaj**, koraj gestoj estas ne nur nepreterlaseblaj formoj, sed samtempe ankaŭ tiaj moralaj kaj sentaj enhavoj, kiuj vekas similajn ankaŭ en la aliuloj. La kulturitecon kaj estetikon de la sento-esprimoj hodiaŭ la infanoj apenaŭ ellernas en la lernejoj kaj en la familioj. Kvankam tio estus tre-tre bezonata.

Sed vere, kion povas fari la lernejoj kaj familioj en la kulturado de la enhavriĉaj sentoj? Nepre pli multe ol ili faris ĝis nun. Ni devas interkonsenti esence je tio, ke la sentojn eblas, eĉ necesas evoluigi, kulturi kaj — kvankam nekredeble — instrui.

Estas konate, ke estas bone bazita la argumento, laŭ kiu la lernejoj ne kapablas konsideri ĉiujn pretendojn, kiuj estas atenditaj de ili. La personaj kaj materialaj kondiĉoj same estas mankhavaj. La argumentoj de la familioj pri la tempomanko same devas esti akceptitaj, kvankam estas certe, ke la semajno-finaj du libertagoj iom povas influi tion. Tamen, ni devas serĉi kaj trovi la vojon al la pliriĉigo de la senta vivo de niaj infanoj.

Povas esti unu el la vojoj fari pli kulturitaj, emocie pli variaj la enhavon kaj formojn de la kunestoj kaj en la lernejoj, kaj en la familioj — eĉ en la laborejoj. Tio estas nepre realigebla per kulturitaj memdisciplino kaj atentemo. La alia vojo estas formi vivkoncepton, laŭ kiu en niaj ĉiutagoj vaste ekzistas familiaj, lernejaj, laborejaj ĝojfontoj, travivaĵoj, kiuj — krom ceteraj — kontribuas al la pliriĉiĝo de la senta, emocia vivo — oni devas nur malkovri ilin.

Eblus verki multe pri la komplika sentaro de la nuntempaj homoj. Tio, kion ni skize tuŝis, estas nur ereto de la temo. Nur iaspeca veko de la atento.

Elhungarigis: Imre SZABÓ

**Se vi ankoraŭ ne legis:**

Paŭli, E. – *Internacia Humanisma Edukado*, en: Filozofia Revuo «Simpozio», sept. 1985, 3-a jaro, n-ro 6-a, pĝ. 12-19;

Marin, J. – *Optimismo kaj edukado*, en: «Literatura Foiro», junio 1985, 16-a jaro, n-ro 91, pĝ. 18-19.



# Psikolingvistiko

## LA "DU CERBOJ" DE LA HOMO

Anna VIRÁG

*(Freŝaj informaĵoj pri la funkcia asimetrio de la homa cerbo)*

**La plej freŝaj rezultoj, kompletigantaj la jam delonge studitajn kaj konfirmitajn spertojn pruvas, ke la strukturo de la homa cerbo ne estas tute simetria. Nome, tiu cerbokrusta tereno, kiu enhavas parton de la parolcentro, ĉe dekstramanuloj pli grandas en la maldekstra flanko ol en la dekstra. Do la grandcerbokrusta reprezentiĝo de la parolkompreno, parolrekono kaj parolprogramado estas unuflanka. Kontraŭe, la cerba reprezentiĝo de la vido, palpo kaj aŭdo estas simetria: la cerbokrustaj akceptaj terenoj troveblas en ambaŭ cerbo-duongloboj kaj ili estas samgrandaj. La kunligon de la du duongloboj certigas la nervosistemo nomita "*corpus callosum*." Nia artikolo resumas la plej freŝajn rezultojn kaj eksperimentojn en tiu ĉi temaro. La kono de ero de la plej freŝaj rezultoj rilate la specialiĝon de la cerboduongloboj estas eĉ pli aktuala, ĉar antaŭ nelonge estis premiita per Nobel-premio la psikobiologo ROGER SPERRY, pro liaj ĉirilataj pioniraj studoj.**

Surbaze de la *klinikaj-eksperimentaj* spertoj pruviĝis, ke la strukturan asimetrion de la homa cerbo multe pli superas la funkcia asimetrio. Ŝajnis, ke la simetrie lokitaj vidaj, palpaj kaj aŭdaj zonoj rezultas malsamajn respondojn dependе de tio, ĉu la incito venis al la dekstra aŭ maldekstra flanko de la cerbo. Ili konfirmis ankaŭ tion, ke ne eblas rekte konkludi de la struktura asimetrio al la funkcia, tamen estas tre verŝajne, ke la kaŭzo de la malsamaj respondoj estas la unuflanka parolcentro.

En la nuna fazo de la esploroj oni studas tion, kiamaniere, je kiaj ŝanĝoj respondas la dekstra, respektive la maldekstra duonglobo sur la terenon de vido, palpo kaj aŭdo, do tion, kiajn respondojn rezultas la ĉeesto kaj funkciado de la parolcentro en la respondoj de la cerbo.

### La vido kaj palpo

NEBES en sia resuma studo raportas pri tiaj eksperimentoj, en kiuj

partoprenis personoj kun disigita cerbo: do la ligo inter la du duongloboj estis ĉesigita. (Tio ĉi estas operacio por sanigaj celoj, dum kiu oni tranĉas la *"corpus callosum"* kaj sekve de tio la unuflanka epilepsia konvulsio ne atakas la simetrian aliflankan terenon. La homoj kun tia cerbo nomatas *"split brain"* [angla, pron. split brejn] -homoj.

En la eksperimentoj oni projekciis figurojn, ekz. liniojn, literojn aŭ desegnaĵojn de geometriaj korpoj sur la dekstran aŭ maldekstran flankon de iu ekrano kaj la partoprenantoj de la eksperimento devis per palpo elekti la surekrane viditan el inter la objektoj lokitaj malantaŭ la ekrano. Tiel surbaze de dudimensia figuro ili devis elekti per manpalpado la tridimensian objekton, kiun ili nature ne povis vidi. La rezultoj montris, ke la du duongloboj de la cerbo specialiĝis por diverstipaj solvmanieroj: la dekstra duono — kiu ĉe dekstramanuloj ne enhavas la parolcentron — donis pli precizan rekonon en tiuj taskoj, en kiuj oni petis la rekonon de la direkto kaj dimensio de la instigoj aŭ de la proporcio de la parto kaj unuo. Aliflanke la maldekstra duono donis pli bonan rezulton en la taskoj, kiuj postulis la determinon de la kvanto de instigoj (ekz. la nombro de projekciitaj punktoj, linioj) aŭ ties longeco, grado. Same pli bone rezultis la maldekstra duono en la plejmulto de lingvaj taskoj. En tiuj ĉi lastaj la partoprenantoj devis nomi kaj rekoni presitajn substantivojn, verbojn, adjektivojn kaj objektojn, samkiel figurojn de movoj.

La ĉi-suba ekzemplo ilustras la funkcian diferencon de la du duongloboj: du junaj malsanuloj partoprenis en tiu ĉi eksperimento. Ili povis vidi alternative sur la dekstra kaj maldekstra flankoj de la ekrano la ciferojn 1 kaj 0: ilia tasko estis nomi tion kion ili vidas. Ili bezonis pli longan tempon por respondoj tiam, kiam la projekciitan figuron observis la dekstra duono. Se en la eksperimento oni uzis ne nur la ciferojn 1 kaj 0, sed ankaŭ la aliajn, tiam por la pli granda cifero (ekz. 8) oni mezuris proporcie pli grandan tempon ol por la malpli granda (ekz. 2) se ambaŭ estis projekciitaj por la dekstra duono. Ŝajnis, ke la malsanulo per la maldekstra duono kalkulis ĝis kiam atingis la projekciitan numeron, observatan de la dekstra duono.



Do en la parolkarakteraj taskoj estis pli bonaj la rezultoj de la maldekstra duono. Sed oni pruvis lingvajn kapablojn ankaŭ ĉe la dekstra duono. Per la helpo de la dekstra duono la malsanuloj sukcese palpis literojn, formis el ili vortojn, skribis, kopiis tiujn, sed nomi, elparoli kapablis nur la projekciitajn mallongajn vortojn.

Surbaze de la eksperimentaj rezultoj NEBES imagas la "labordividon" de la duongloboj tiamaniere, ke la duono, ne enhavanta la parolcentron (dekstra) manipulas la incitojn kiel kompleksajn unuojn (objekto, vorto, figuro de ago, vizaĝo ktp.). La maldekstra duono, aliflanke, prilaboras la alvenantajn incitojn sinsekve (nombras, dispartigas, dividas je unuoj) kaj asocias vortojn al la gravaj detaloj. Tiu ĉi plej lasta funkcimaniero necesigus do la partoprenon de la parolcentro.

**Lingvaj kaj akustikaj taskoj**

Se la vidaj kaj palpaj incitoj rezultis duongloban asimetrion depende de tio, kiomgrade la taskoj bezonis la partoprenon de parolcentro, tiam justas la supozo, ke la akustikaj incitoj rilatantaj al la parolo evidente bezonas la pli intensan partoprenon de la maldekstra duonglobo.

Oni faris ankaŭ sur tiu ĉi tereno multnombrajn eksperimentojn. En la akustikaj eksperimentoj oni devis venki unue tiun malfacilaĵon, ke oni devis apartigi la du duonglobojn unu de la alia. Nome, se oni ĉesigis la kunligon en la krusto tamen restis la unueco de la centro lokita sub la krusto. Fine ŝajnis la *diĥotika* tekniko la plej taŭga: tiu ĉi incita metodo havis la eksterordinaran avantaĝon, ke ĝi ebligis la studadon ankaŭ de sanaj homoj. La plej grava karakterizo de la metodo estas, ke en ambaŭ oreloj de la observitaj personoj samtempe eniĝas malsama incit-materialo (ekz. vorto-serio) tra orel-aŭskultiloj. La partoprenantoj poste devis raporti pri la aŭditaĵoj.

TREISMAN kaj GELLER per sia studo donas bonan ekzemplon, por la *diĥotika* eksperimento uzanta parolinciton. La studita persono ricevis en ambaŭ orelojn tra aŭskultiloj malsamajn tekstojn. Li devis

rediri la aŭditaĵon de unu specifa orelo senĉese kaj per la puŝo de butono devis indiki la rekonon de celvortoj en la teksto. Oni trovis, ke la persono pli ofte respondis per butonpuŝo tiam, kiam la celvorto iris al la dekstra orelo kaj pli ofte eraris tiam en la re-citado, se tiu iris al la maldekstra orelo.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

En la eksperimentaj situacioj, similaj al la ĉi-supra, ili devis rekoni, sekvi, reprodukti, sensencajn vort-elementojn, sencajn unu- aŭ plur-elementajn vortojn, sencohavan parolon diferencigi parolvoĉojn laŭ iliaj lingvaj aŭ fizikaj karakteriziloj. La plejparto de la esploristoj spertis, ke en la eksperimentoj per parolincitoj la rezultoj de la maldekstra duonglobo kutime superas tiun de la dekstra, dum la akustikaj incitoj ne rekte rilatantaj al la parolo (ekz. bruoj, sono de objektoj, ploro, rido ktp.) ne kaŭzis evidentan pli bonan rezulton por la maldekstra duono. La rezultoj verŝajnigis tiun supozon, ke en la prilaborado de la lingvaj incitoj regas la maldekstra duono, enhavanta la parolcentron: ne estis tamen klare, per kiaspeca funkcia karaktero kontribuas la parolcentro al la observado de la lingvaj fenomenoj.

**Muzikaj taskoj**

Unu el la karakterizaj, ne parolspecaj sonogrupoj estas la muzikaj sonoj. En la studado de la asimetrio havas la avantaĝon, ke ĝi en kelkaj siaj karakteroj analogas al la vidaj incitoj, per aliaj karakteroj al la parolsonaj. Tiel ekzemple — simile al la figuroj konsistantaj el punktoj kaj linioj — per kiom ajn sonoj je plej diversa alteco determineblas la forteco, movdirekto, distanco (en alteco kaj tempo), daŭro, sub- aŭ superordigiteco, tembro, konturo. Ili estas figureblaj, sed ankaŭ akustike senteblas la sonoj, paŭzoj, sonobstrukcoj sekvas unu la alian, samkiel ĉe parolsonoj. Kaj la reguloj de la tempa organiziteco de muzikaj sonoj kaj paŭzoj estas tute same iloj de la komunikado kiel en la parolo.



☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

En la esplorado de la asimetrio la plej multflankajn rezultojn donis le *melodi-observadoj*. La incitmaterialo de la eksperimentoj plejparte konsistis el partoj de konataj melodioj (po unu strofo). La partoprenantoj devis rekoni kaj kanti, zumkanti la aŭditaĵojn. Oni multfoje aplikis ankaŭ la *diĥotikan* teknikon.

En la eksperimento de GORDON kaj BOGEN ekzemple oni dormigis unu duonon de la cerboglobo: per tio ĉesis provizore jen la funkciado de la dekstra, jen la maldekstra duonglobo. Antaŭ, dum kaj post tio la partoprenantoj kantadis konatajn kantojn kun aŭ sen teksto. Dum la efiko de la medikamento la kantado pli suferis ol la parolo tiam, kiam la dekstra duono dormis; la ritmorekono aliflanke suferis pli, kiam dormis la maldekstra duono. Aliaj esploristoj en similaj eksperimentoj kun ritmaj melodi-rekonaj taskoj venis al la starpunkto, ke en la rekono de la sonalteco pli gravas la dekstra, en la rekono de la ritmo la maldekstra duonglobo.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Oni tamen devas kritiki la eksperimentan metodon de la melodi-rekonado. La esploristoj rekonis, ke ili povas ricevi klaran bildon nur tiam (rilate la altecon de la sonoj), se la ritmon oni apartigas de ĝi. Kaj aparte analizas la karakterizojn de ambaŭ. La rezultoj de la eksperimentoj kun melodiaj kaj nemelodiaj sonserioj fine alportis ion novan rilate la duoncerban asimetrion. La sonserioj, aplikataj en la eksperimentoj konsistis el 12-18 sonoj; parto de ili estis melodia, parto ne. En unu el la taskoj ili devis rekoni certan parton de la serio, en alia tasko ili devis diri pri la tuta serio, ĉu tiu jam estis aŭ ne. La seriojn ili ricevis foje nur en la maldekstran, foje nur en la dekstran orelon; la partoprenantoj respondis aŭ buŝe aŭ per butonpuŝo. En la eksperimentoj partoprenis spertaj muzikistoj kaj nespertaj amatoroj. La partojn de serioj kapablis rekoni nur la muzikistoj, iliaj rezultoj estis tiam pli

bonaj, kiam la incitmaterialo alvenis al ilia maldekstra duonglobo. La seriojn rekonis kaj la muzikistoj kaj la nemuzikistoj, sed la muzikistoj tiam havis pli bonajn rezultojn, kiam la incitoj alvenis al la maldekstra duono, la nemuzikistoj sukcesis pli bone, kiam la incito alvenis al ilia dekstra duonglobo.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

La labor-disdivido de la cerboduonoj fine imageblas jene: La observado de longa eksperimenta serio daŭras longe. Se la eksperimenta tasko signifas ankaŭ la analizon de la aŭditaĵoj, tiam tio rezultigas la pli intensan funkciadon de la maldekstra duono. Se la eksperimenta tasko postulas la observadon de la incito kiel unueca tuto, tiam la rolo de la dekstra duono pli akcentiĝas. Por la analizo necesas praktiko, edukiteco. La kapablo kompreni ion kiel tuton rolas dufoje: unue, kiam ni ankoraŭ ne kapablas analizi kaj due, kiam ni jam preterpasis la analizon. En la eksperimentoj la sperton reprezentis la muzikistoj, la nesperton la amatoroj.

Se la rezultojn de la sonserioj ni komparas kun la rezultoj de la vidaj kaj palpaj studoj, tiam ŝajnas, ke ĝeneraligeblas la konstato, ke la maldekstra duono rolas en la sekvencaj taskoj, postulantaj analizon, dum la dekstra en la sintezaj taskoj, kaj kiam oni devas kompreni kiel tuton la aferon, rolas ne ekskluzivan, sed regan rolon. La graveco de parolcentro ŝajne estas tio, ke tiamaniere eblos la analizo, divido, dispartigo de la daŭraj incitoj kun ajna modaliteco. Tiu ĉi sama estas la funkcio de la parolcentro ekz. en la formado de parolsonoj (vokaloj-konsonantoj) aŭ ankaŭ ĉe vortfarado.

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Fine nepre ni devas mencii, ke la eksperimentoj kutime produktis eksterordinaran situacion por la laŭeble plej preciza malkovro, studo




de la eventoj. Do en tiu ĉi situacio ni povas paroli pri tio, ke la du partoprenantaj duongloboj de la homa cerbo en eksterordinaraj kondiĉoj montras malsamajn kapacitojn. Ĝuste tial la solvo de la eksperimentaj taskoj estas tre malfacila, ĉar en tiaj situacioj gravas, ke ni povu mobilizi la kapaciton de la duonglobo, kaj ne la senerara, rapida solvo de la tasko. Kiam ajn iu atingas elstare altan nivelon en la solvo de iu tasko, ni ne trovos indikojn por la asimetrio. Tio povas pruvi, ke por la altaj rezultoj respondecas ambaŭ duonoj kolektive per sia harmonia funkciado.

**Proponata literaturo**


Ivanov, V.V. – *Gerade und Ungerade: Die Asymmetrie des Gehirns und der Zeichensysteme.* El la rusa trad. W. Petri. Eldono: S. Hirzel, Stuttgart 1983. 221 pĝ. La ruslingva originalo: Moskvo 1978.

1.




*Figuro 1* – Skemo de cerbokrusta foto, sur kiu videblas la temporal-tereno (PT = planum termporalum) kaj la tielnomata Heschl-giro (HG), ambaŭ asimetrie lokitaj.

Figuro 2 – Ĉe malsanuloj kun tranĉita cerbo, pro la tranĉo de *corpus callosum* ĉesis la kunligo de la du duongloboj. La funkciado de la maldekstra duono regas en la skribo, parolo, verba pensado, kalkulado; la dekstra duono regas en la neverba pensado.





*Figuro 3* – En la eksperimenta situacio la paciento sidas antaŭ la ekrano, kontraŭ li la eksperimentanto. La paciento vidas la ekranon, tamen ne sian manon.

3.



4.








*Figuro 4* – La "split brain" homo diras tion, kion per sia maldekstra duonglobo observas, kaj per sia maldekstra mano palpas tiun literon, kiun vidas sur la dekstra flanko de la ekrano.

*Figuro 5* – La figuron, projekciitan en la maldekstran vidterenon la paciento observas per sia dekstra duonglobo, kaj respondas per la helpo de la motora centro, lokita en la dekstra duonglobo.

5.



6.



*Figuro 6* – Per sia dekstra mano la paciento ne kapablas ĝuste respondi, ĉar la motora centro, reganta la dekstran manon lokiĝas en la maldekstra parto kaj kun ĝi ĉesis la ligo.

Elhungarigis Csabo LENDVAY

# Lerneja Lingvopolitiko

## KIA LERNEJO EN EŬROPO?

Giordano FORMIZZI – Aldo BERGAMASCHI

*Si una lingua esset in mundo, accederet in effectu generi humano tertia pars vitæ, quippe quæ linguis impenditur.*
G.W. LEIBNIZ

### Premiso

*Changer la culture et la politique*
(ESPRIT)

La proponoj pri nova lernejo aŭ ekiras ankaŭ novan vojon aŭ paŭsas jam preterpasintajn modelojn. Se la edukaj principoj ne ŝanĝiĝas, ni vane serĉas aŭ prilaboras lernejajn aŭ didaktikajn planojn: novaj flikaĵoj en malnova vesto nenion renovigas kaj la vesto estos poste pli ĉifona ol antaŭe.

La jena 'dokumento' naskiĝis por respondi, per sincere kunlabora spirito, al instigo venanta de kelkaj niaj universitataj kolegoj, kiun ni pensis digna je respondo.[1]

Al ni ŝajnis utile interveni kritike, por difini — sen iu ajn dogmatismo tamen firme fidante je niaj konvinkoj — la fundamentajn projektliniojn, kiuj baziĝas sur la "plenuminda devo", ĉu en la didaktiko ĉu, precipe, en la eduka kampo, kie homo estas kune kun sia spirito tute kunvolvita. Estas superflue aserti, ke nia aktuala mondo daŭre antaŭmetas al niaj okuloj ĉiam la samajn "nesolvitajn" problemojn, kaj ke ĝi postulas de ni novajn pensmanierojn, novajn efikajn instrumentojn, disponon eltrovi **la** solvon. Se ni apogas nin nur sur tio, kion ni antaŭe ĉiam faris, ni riskas ŝtopi nin mem en persista "fremdiĝo". La fariseo kaj la ekzegezisto apelacias al la leĝo (pasinteco) por pravigi sian nunan konduton, kaj ili forgesas gajni "la originalon" kaj tiel farante ili restas *"conservatores temporis acti"*.



Ĉu ni parolas tro teorie? Ĉu antaŭeco de teorio fronte al praktiko ne signifas necese kritika tasko de la unua pri la dua? Tio estas uzi rigore kritikan racian kribrilon, por rikolti "la plej bonon" kaj nur tiel esti rajtigita paroli pri eduko. Aŭtentikaj novaĵoj estas en sia simpleco tiel konfuzigaj, ke ĉiu kontraŭparolo iĝas naiva: Kristo kaj Nikodemo, Sokrates kaj Ateno.

Iaspeca "neraciismo", kiu subtenas ĉian utopion estas, eble, iometo da salo, kiun ni bezonas por ne droni en tro da "neĝusta raciismo", kiu mortigas ĉiun elanon, ĉiun entuziasmon, ĉiun progreson. La "utopia neracieco" — ni scias ĝin el la historio — ofte estas nur antaŭ-anonco al alie fundamentita racieco, kiu kapablas produkti "nov-kvalitan salton" ene de l' homo kaj de lia historio.

### Dokumento

*En tiu momento mondlingvo estas pli grava ol iu ajn mekanika progreso.*
L. MUMFORD

Nia propono sinteze estas do la jena:

- Eŭroplaneda lernejo de bazlernejo ĝis la universitato, kun komunaj programoj, en la kadro de dulingva instruado, kie la Internacia Lingvo, por ĉiuj egale, estas instruata flanke de nacia (gepatra) lingvo.

Ni pensas, ke la plurlingveco (plurlingvismo) estas historia fakto, kiu similas al politeismo. Ĝi ne estas riĉeco, sed instinkta eksplodo je antropologiaj baroj kaj obskura fonto de interhomaj konfliktoj, kiujn la edukado nepre devas imputi kaj venki sen kiu ajn plorado.

Same kiel la divido de la mondo en suverenaj naciaj ŝtatoj estas trafike ridetanta imago de profunda interhoma dismembriĝo, tiel la plurlingveco devas esti rigardata kvazaŭ anomalio ne plu tolerebla fare de *Homo sapiens*.

La homaro, pli aŭ malpli konscie, trapasinte etnocentrajn ĉiam ripetiĝantajn epilepsiojn, ekserĉas la vojojn de sia unuiĝo. Tiuspecan bezonon-alvenpunkton oni povas akiri kaj plenigi nur pere de rezignoj, kiuj kunprenas la 'genon' (psikon) kaj la 'medion' (historion).

*Nia "Peticio al Eŭropa Parlamento" estas do la jena.*

Por 'progresi' kaj por ne 'perei' estas necese:

1. – konstrui, en la internacia kampo, Eŭropan Federacian Ŝtaton kiel antaŭpaŝo al neniigo de la "pereiga dogmo de la ŝtata suvereneco" (L. EINAUDI) kaj al la starigo de tutmonda federacio, konsiderante la homojn kiel membrojn — ĉiuj — de sama homa familio;
   – konstrui, en la interna kampo, federalisman socion bazitan:
   a) sur la principo de disdivida suvereneco,
   b) sur la disvastiĝo de *aŭtonomio* en la ekonomikajn kaj socikulturajn institucioj, celante formi tutan organismon, en kiu la vivo de unuopuloj kaj de grupoj povu sin esprimi kiel "aro da senfinaj aŭtonomioj" (C. LEVI). Aŭtentika scienca esploro limigita ene de la hodiaŭaj naciaj ŝtatoj, universala frateco kune kun ŝtataj limoj estas sensenca kontraŭeco nekunigebla kun la nova kulturo en kies nomo ni volas edifi nian estontecon.
2. – Alvoki la *homo religiosus* al severa kritika ekzameno pri historia atingo de liaj metahistoriaj certecoj. Se la "religio" ne povas kunigi la homojn, formanĝegas sian propran difinon kaj elmontras nominalisman nocion pri "Dio". Ĉar ne eblas trovi objektivan juĝkriterion pri la vero sur kampo en kiu la finaj certecoj estas *fide* akceptitaj, ni devas nepre nin ankri al *"Principo de kontraŭdiro"* kaj deklari savpova nur tiun 'fidon', kiu montriĝis kapabla *solvi* ene de ĝi, teorie kaj *praktike,* la problemojn pri la socia kunvivo (superregado de homo sur homo) kaj pri la politika kunvivo (superregado de iu grupo sur la aliaj). Pri tiuj du temoj — estas necese ĝin rekoni — la historiaj religioj seniluziiĝis, aŭ miskomprenis la 'mesaĝon' de la 'profeto' aŭ de l' Dio.

   Same kiel la pluraj kulturoj ne konsistigas *konflikton* inter sciencistoj, sed male ĝeneralan batalon kontraŭ senklereco, tiel la pluraj kredoj neniam devas fariĝi konflikto inter 'kredantoj', sed atingi multflankan venkon kontraŭ la evidentaj homaj fremdiĝoj.

3. – Favori la iom-post-ioman enkondukon en ĉiujn lernejojn de la mondo — el tio konsistas la altiranta ekzemploriĉa strebo de Eŭropo — de la Internacia Lingvo, kiu permesu:
   a) definitive neniigi ĉiun kulturan koloniismon volon;
   b) radikale ekskludi la naskiĝon de kiu ajn privilegio ŝuldata al lingva nesimetrio;
   c) realigi la premisojn por universala rekta hom-interkomunikado, respektante la fundamentajn edukajn principojn kaj tiujn de la socia kunvivo;
   ĉ) reakiri grandvaloran "lernejan tempon" por investi ĝin en la lernado de nova "teknologia kono" (enhavo) anstataŭ ĝin malŝpari por akiri malnovajn signojn (ilaron) de faklimigita komunikado;
   d) klopodi ke la tutmonda procento de disleksiuloj fariĝu venkebla handikapo malgravigante la nunajn psikologiajn distancojn, kiuj ekzistas inter la normalecaj kaj la nenormalecaj unuopuloj;
   e) liberigi la lingvominoritatojn el "historia timego" fronte al pli fortaj proksimuloj (najbaroj), donante al ili la eblecon refluigi — sekve savi — en la trankvilan oceanon de unueco ilian specifan kulturan riĉecon;
   f) ekzorci la "malbenon de Babelo", starigante "universalan popolon", en kiu eblu "plenplena" interŝanĝo de pensoj, en kiu ĉiuj povu alproprigi la *tutan* konon akiritan de la homaro kaj per kiu oni povas rekomenci la pacigan okupacion de la ĉielo.

Ni estas konvinkitaj, ke la *INTERNACIA LINGVO ESPERANTO* estas la ilo racie plej taŭga kaj "jam preta al uzado" por atingi la supremenciitajn celojn.

**Notoj**

1. La *Centro San Domenico* en Bologno (Italujo), la 9-an de majo 1985, sendis al Eŭropa Parlamento en Strasburgo "Peticion por Eŭropa lernejo: el mezgrada lernejo ĝis la universitato per komunaj programoj, ene de plurlingva instruado."
Tiun "Peticion" — kiun oni poŝtsendis al plej gravaj lernejaj kaj ŝtataj instancoj naciaj kaj eŭropaj — sciigis ene de Verona Universitato la profesoroj ANTONIO GRASSANI kaj GIORGIO SAVIO el Ekonomia Fakultato, pridemandante subskribon aŭ opinion.

UNIVERSITATO DE VERONA, JULIO 1985

**Du legindaj studajoj de G. FORMIZZI:**

*Perspektiven für einen sprachlichen Föderalismus*, en: Von der freien Gemeinde zum föderalistischen Europa. Ed. F. Esterbauer k.a. Eld. Duncker & Humblot, Berlin 1983, pĝ. 489-504, kaj:
*Per un plurilinguismo neutrale e democratico*, en: Verso una educazione interlinguistica e transculturale... Red. G. Mazzotti, Antaŭparolo de A. Martinet, Eld. Marzoreti, Milano 1984, pĝ. 186-188.



# Instrupraktiko

## SPECIMENA EKZAMENO

La ekzamenoj en siaj nunaj formoj — kiel celo de instruado kaj ilo por determini la rajton al plua studado — estas ofte atakataj. Sed la klaso ĝuas ekzamenon je la fino de la kurso kaj per ĝi ricevas ian mezuron de la propra progreso.

Se temas pri ekzameno pri fremda lingvo, estas rekomendinde laŭeble eviti la uzadon de la nacia lingvo krom en tradukekzercoj (multaj geinstruistoj ne ŝatas la tradukadon, tamen ĝi povas doni kontentigan senton al la lernantoj, kiuj bezonas kuraĝigon).

Ĉi-sube estas ekzemplo de ekzerco, kiun oni povas uzi kiel legan aŭ (por progresintaj klasoj) aŭdan tekston. Oni povas adapti la specimenon al la propra klasnivelo; multaj instruantoj preferus simple fari demandojn pri la teksto, respondendajn per kompletaj frazoj.

Se la teksto estas nur aŭda (t.e. la klasanoj ricevas nur la demandaron en skribita formo kaj la tekston ili devas aŭskulti) oni sekvu la jenan *proceduron*:

1. La ekzamenanto laŭtlegu la tekston; dume la klasanoj ne rigardu la demandaron.
2. La klasanoj legu la demandaron; ekde nun ili rajtas marki siajn elektojn.
3. Post kelkaj minutoj la ekzamenanto ree laŭtlegu la tekston.
4. Je la fino de la permesita tempo la ekzamenanto legu la tekston trian fojon; tuj kiam finiĝos la legado, la klasanoj demetu la skribilojn.

**Teksto**

*Saluton, mi nomiĝas Pierre. Jes, vi ĝuste divenis, mi estas franco. Antaŭ nelonge — apenaŭ tri monatoj — novaj najbaroj okupis la apudan domon. La familio nomiĝas Dubois, kaj oni supozus, ĉu ne, ke ili*

*estas francoj, sed fakte ili elmigris el Usono.*
*Tuj mia patrino diris: "Ĉiam estas malagrable, kiam la najbaroj estas eksterlanduloj — sed usonanoj, jen vera katastrofo!" Kaj la unuan vesperon ŝajnis, ke ŝi pravas; iom antaŭ noktomezo bruis laŭta radiomuziko el ilia domo. Tuj mia patro kriegis tra la fenestro: "Fi! Civilizitoj ne faras tiaĵojn!" Kelkajn minutojn poste la radio eksilentis. La postan tagon mia patrino observis, ke unu el la najbaraj knaboj eniras ilian domon sen skrapi la koton for de la ŝuoj. Ŝi parolis pri sovaĝuloj. Unu semajnon poste ŝi raportis al ni, ke tiuj malpuremaj usonanoj ankoraŭ ne purigis siajn fenestrojn. Panjo kredas je Dio kaj duonsemajna purigado de fenestroj.*
*Sed la vera aĉaĵo okazis antaŭ unu semajno. Studante lernolibron de la japana — jen mia ŝatokupo — mi ekkonsciis, ke iu staras sur la balkono de Dubois-a kaj manĝigas paserojn. Tio estas ja tro!! Ĉu ili ne scias, ke, se kelkaj paseroj ricevas manĝaĵon ie, tuj venas amaso da aliaj, kiuj lasas siajn malrespektaĵojn sur la balkono, fenestroj kaj muroj?*
*Mia pacienco forvaporiĝis. Mi ekmarŝis al la domo de tiuj Dubois-oj por firme sciigi al ili, kian stultaĵon ili faras. Sed...*
*Sur la balkono, ĉirkaŭate de paseroj, staris la plej bela kaj rave dolĉa knabino, kiun mi iam vidis. Verŝajne dekokjara, kaj mi estas dudek-unu-jara solulo. Ŝia nomo estas Marie, Marie Dubois.*
*Mi bedaŭras, ke mi ne plu havas tempon por rakonti al vi pri niaj novaj najbaroj. Vidu, mi devas nun foriri... helpi al Marie manĝigi paserojn.*

**Demandoj**

Faru cirklon ĉirkaŭ la literon de la ĝusta alternativo!

1. *Kiam Pierre ekskribis, la najbaroj jam loĝis tie dum:*
   A proksimume unu monato  B preskaŭ 3 semajnoj
   C ne pli longe ol 3 semajnoj  D antaŭ nelonga tempo



2. *Pierre supozis ke la najbaroj estas francoj pro:*
   A ilia prononcmaniero  B ilia manko de kulturo
   C ilia aspekto  D ilia nomo
3. *La opinioj de la patro supozigas, ke li estas:*
   A ŝovinisto  B muzikfakulo
   C antropologo  D radikalulo
4. *La unua indiko, ke la najbaroj estas necivilizitoj, estis ilia:*
   A malpureco  B ebrieco
   C filingvo  D laŭteco
5. *Kiam la patro protestis, la ĝeno ĉesis:*
   A post nelonga tempo  B tuj
   C tute ne  D la postan matenon
6. *La patrino de Pierre kritikis la knabon, ĉar li:*
   A malpurigis la plankon  B kuris en la domo
   C kuris en la domon  D ne portis ŝuojn
7. *Pierre skribas pri sia patrino:*
   A admire  B fanfarone
   C ironie  D kolere
8. *En sia libera tempo Pierre verŝajne plej volonte:*
   A postkuras knabinojn  B aŭskultas muzikon
   C faras ornitologiajn esplorojn  D studas lingvojn
9. *Pierre intencis protesti al la najbaroj pri:*
   A malŝparo de manĝaĵo  B la bruo de la paseroj
   C la malpuraĵoj de la birdoj  D la pliiĝo de la paseroj
10. *La rakonto indikas, ke en tiuj najbaraj interrilatoj la decida faktoro estis:*
    A toleremo  B la sagoj de Kupido
    C rezoluteco  D komunaj interesoj

**Alvoko de la redaktoraro**

Ĉi tiun proponon ni transprenis el P.A.P.I.E. (Pacifika Asocio Por Instruado de Esperanto, 1979/3:15, pĝ. 2-5). Niaj legantoj estas petataj sendi siajn rimarkojn, kritikojn pri tiu propono al la Ĉefredaktisto. La plej bonaj kritikoj estos premiotaj!

# Ruĝa Krajono

● *Instruistoj pri geografio, atenton!*
Demando: **En kiu lando situas Budapeŝto?**
Fotokopiaĵo el la N-ro 318, jan. 1980, de la:

★ REVUE FRANCAISE
★ D'ESPERANTO
★
★ **ESPERANTO**
★ **ACTUALITÉS**
★

Ces informations sont extraites ce mois-ci des revues esperantistes "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "Literatura Foiro" et tendent à présenter un panorama des principaux évènements de l'année.

## Rencontre Austro-Danoise

Le 18 Avril 1979, à Budapest, a eu lieu une rencontre entre l'ambassadeur du Danemark, H.H. Haxthausen et le professeur I. Szerdahelyi. Le Parti Progressiste Danois a déposé une demande au Parlement afin que le représentant danois aux Nations-Unies proposât à cette Assemblée d'examiner une convention internationale pour



l'introduction de l'Esperanto comme première langue étrangère dans toutes les écoles. L'ambassadeur demanda toutes informations nécessaires à Szerdahelyi car, à Budapest existe une section officielle universitaire d'Esperanto à laquelle est liée l'étude scientifique de la langue.

Por tiuj, kiuj ne komprenas la francan:

**Aŭstra-Dana Renkontiĝo**

"La 18-an de aprilo okazis en Budapeŝto renkontiĝo inter la ambasadoro de Danio, H.H. Haxthausen, kaj la profesoro I. Szerdahelyi. La Dana Progresisma Partio prezentis peton al la Parlamento, por ke la dana reprezentanto ĉe la Unuiĝintaj Nacioj proponu al tiu Asembleo ekzameni internacian konvencion pri la enkonduko de Esperanto kiel fremda lingvo en ĉiuj lernejoj. La ambasadoro petis ĉiujn informojn necesajn de Szerdahelyi, ĉar en Budapeŝto ekzistas oficiala universitata fako pri Esperanto, al kiu apartenas la scienca esploro de la lingvo.

◆ **La preseja diableto serpentumas**

En la populara libreto de P. BURNEY, *Les langues internationales* («La internaciaj lingvoj»), PUF, Paris 1962, pĝ. 22, la aŭtoro skribas, ke la artaj lingvoj aperadas amase kaj portas la plej strangajn nomojn (ĉi-loke la aŭtoro listigas 19 nomojn) kaj poste: "Ni distingu en la amaso de restintaj la *Carpophorophilus* kaj la *Astegoniagraphianek* ..."

En tiu ĉi unusola frazo estas du grandaj eraroj:
**unue:** CARPOPHOROPHILUS ne estas nomo de lingvo, sed

pseŭdonomo de verkisto (laŭ BAUSANI eble de LEIBNIZ; laŭ la rezulto de miaj esploroj tiu pseŭdonimo ne povis aparteni al LEIBNIZ sed tre verŝajne al iu lia epigono);

**due:** kio estas tiu terura, apenaŭ prononcebla *"Astegoniagraphianek"*?

En *"Bibliografio de Internacia Lingvo"* de P. STOJAN (Genève 1929) ĉe la n-ro 5706 (pĝ. 473), oni trovas la jenan verkon:
Gáti I. – *ASTEGANOGRAPHIANEK Philosophica vagy univ. nyelvnek* 1820, Budapest...

En la *"Historio de la Mondolingvo"* de E. DREZEN (Leipzig 1931) sur la paĝo 70, piednoto n-ro 4:
Gati Istvan – *"A steganographianek ... Philosophica vagy universalis nyelvnek"*, Pesten 1820.

Nun ni vidu la erarojn: ĉe STOJAN la nomo estas ĝuste skribita, ĉe DREZEN kaj en la familia nomo kaj en baptonomo mankas la supersigno (en la Hungara [a] kaj [á] estas du diversaj vokaloj!). La dua granda eraro de STOJAN estas, ke la eldonlokon li nomas "Budapest". Sed en tiu jaro Budapest ankoraŭ ne ekzistis! Ekzistis tri urboj: Pest, Buda, kaj Óbuda, kiuj unuiĝis en 1872, kaj nur depost tiu jaro ekzistas la urbonomo *Budapest*. Ĉe DREZEN estas ĝusta: *Pesten* = *Pest* + *en*; *-en* signifas fakte 'sur' sed ĉi-kaze 'en'. Sekve: *Pesten* signifas 'en Pest'.

Sed kio pri la "lingvo-nomo"? La vorto *"steganographia"* signifas steganografio, termino eble la unuan fojon uzata de J. TRITHEMIUS, ĉe kiu ĝi signifis kaŝ-skribon, kripto-skribon, sekretan skribon. Ĉe GÁTI ĝi signifas kuntiritan/koncizigitan skribon. *"A"* estas la difina artikolo, kiu en la Hungara havas du formojn: antaŭ vokalo *az*, antaŭ konsonanto *a*, laŭ malnova skribmaniero *a'*. Tiu postpoziciaĵo *-nek* estas la signo de genitivo sed nur ĉe la altvoĉaj sonoj, ĉi-loke devas esti *-nak*. Do, la ĝusta titolo komenciĝas jene:
*A' steganographianak* kaj ĝi signifas "de la steganografio" — ĉar en



Hungara la vicordo ĉe la genitivo estas inversa: unue staras la posedanto kaj poste la posedaĵo. Same ĉio kio sekvas en la titolo kaj ĉe STOJAN kaj ĉe DREZEN estas genitivoj. Do kvazaŭ ni dirus ĉe la libro de DREZEN la titolon tiel: *De la Mondolingvo...* (eĉ tion erare!). La unua parto de la titolo en la originalo estas: *"A' steganographianak I-sŏ konyve"*, kio signifas: "La unua libro de la steganografio". La kompleta titolo estas tro longa por okupiĝi ĉi-loke pri ĝi. La unua kaj plej granda eraro estas, ke oni duonigis la genitivan sintagmon en malbona loko kaj tiel tiu vorto havas nenian signifon. La dua estas la misskribita formo:

| | |
|---|---|
| Originalo: | *A' steganographianak...* [I-sŏ könyve] |
| DREZEN: | *A steganographianek...* |
| STOJAN: | Asteganographianek (jam sen tripunkto!) |
| BURNEY: | *Astegoniagraphianek* jam konsiderata kiel nomo de artefarita lingvo! Mirinda metamorfozo! (Rimarku ĉe BURNEY la intermiksadon de literoj!) |

*(sz-i)*

## Ne SAPEL sed JAPELJ

La mistera G. SAPEL (1744-1807), kiu "ellaboris ankaŭ projekton de gramatiko por interslava skriba lingvo"[1] estas neniu alia ol slovena eklezia verkisto kaj lingvisto Jurij JAPELJ[2]. Li verkis gramatikon, kies plena titolo estas: *"Slavische Sprachlehre, das ist Vollständiger Grammatikalunterricht von der Krainerischen und windischen Sprache, wie sie in Krain, in dem oest. Littorale, in der Grafschaft Görz, in Steyermark und Kärnten gesprochen wird, oder vielmehr gesprochen werden sollte, dann wie sie von den Kroaten, Dalmatiern, Slavoniern, Böhmen, Polen und Russen leicht verstanden werden kann."* En la jaro 1807 cenzuro subskribis la manuskripton, sed ĝi ne estis presita.[3]

Por interlingvistiko estas interesa ankoraŭ fragmento el teksto pri la slovena lingvo, kie JAPELJ proponis, ke "la regantoj kreu societon de kleruloj laŭ ekzemplo de la akademio Della Crusca, kiu 1-e kolektu la

komunajn vortojn, kompreneblajn al ĉiuj slavoj; 2-e eldonu universalan slavan vortaron; 3-e ĝeneralan analizan gramatikon de slavaj lingvoj; 4-e ellaboru por ĉiuj slavoj uzeblan unuecan alfabeton; 5-e eldonu diferencigajn gramatikojn de slavaj lingvoj, verkotajn por slavoj."[4]

La misan nomon SAPEL kaŭzis simpla preseraro en mallonga artikolo de Ig. HOŠEK "Über gemeinslavische Schriftsprachen", aperinta en la unua numero de *"Revue Cosmoglottique"*[5]. "Anstataŭ JAPELJ estas erare presita SAPELJ", konstatas ŠKRABEC en la recenzo de la unua numero de la revuo.[6] Tiun ĉi fonton uzis DREZEN[7] kaj STOJAN[8] (kontrolu!!). La ŝanĝon SAPELJ>SAPEL verŝajne kaŭzis traduko en Esperanton pere de la rusa lingvo.[9] El la du menciitaj verkoj de DREZEN kaj STOJAN la erara nomo de la slovena interlingvisto JAPELJ eniris aliajn interlingvistikajn verkojn.[10]

**Rimarkoj**

1. Drezen, E. – *Historio de la Mondolingvo.* EKRELO, Leipzig 1931, p. 78
2. *Slovenski Biografski Leksikon.* Prva knjiga A–L. V Ljubljani 1925-1932, p. 382-385. (Slovena Biografia Leksikono, Ljubljana)
3. "P. Stojan (*Bibliografio de internacia lingvo.* Genève 1929) enrubrikas la ellaboron de tiu ĉi projekto sub la j. 1790." (Drezen, samloke)
4. *Slovenski Biografski Leksikon*, p. 384
5. Drezen (DREZEN, 1931) rimarkis: "Vidu «Revue Cosmoglottique». Budapest 1912, N-ro 1, p. 12-13; ..."
6. Škrabec, S. – "REVUE COSMOGLOTTIQUE. Organe scientifique-libéral pour tous les amis cosmoglottistes. Rédacteur en chef: A.H. Marieh. Rédaction et administration Budapest, IX. Üllöi-út. 59. [...]" en: «Cvetje z vertov sv. frančiška», Gorica 1912, n-ro 2, p. b-d (kovrilo!)
7. samloke
8. Stojan, P. – *Bibliografio de internacia lingvo*, Genève 1929 (?)
9. Drezen verkis la cititan verkon en la rusa lingvo. La unuan Esperanto-eldonon tradukis, prilaboris kaj redaktis N. HOHLOV kaj N. NEKRASOV.
10. Sed ĝi mankas en: Gjivoje, M. "Jugoslavia kontribuo al interlingvistiko" — *La internacia lingvo – Sciencaj aspektoj.* Red. D. Blanke, Kulturligo de GDR. Centra Laborrondo Esperanto. Berlin 1979, p. 79-89

*(JUG, Janez)*





● **La nova ILEI-Estraro - la unuan fojon kune**
(la 5-an de aŭgusto 1985, dum la 70-a UK en Augsburg)



**De maldekstre: M. Bacev vicsekretario, C. Dazzini sekretario, I. Szerdahelyi prezidanto [staras], E. Symoens vicprezidanto, B. Ragnarsson reprezentanto de UEA-Estraro, B. Andreasson kasisto.**

▲ **UNESKO-Rezolucio n-ro 114.III.AR.XI.11**

La 23-a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Sofio la 6-an de novembro 1985, rezoluciis jene:

La Ĝenerala Konferenco

**konsiderante,** ke la Ĝenerala Konferenco en sia sesio de 1954 en Montevideo, per sia Rezolucio IV-1-4-422-4224 notas la atingojn *pere* de la Internacia Lingvo Esperanto sur la kampo de internacia intelekta interŝanĝo kaj reciproka interkompreniĝo de la popoloj de la mondo, kaj rekonas ke tiuj atingoj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko;

**memorigante**, ke Esperanto faris intertempe konsiderindan progreson kiel ilo por la antaŭenigo de reciproka interkompreniĝo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plej multaj regionoj de la mondo kaj plej multaj homaj aktivecoj;

**rekonante** la grandan potencialon de Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter homoj de malsamaj naciecoj;

**notante** la konsiderindan kontribuon de la Esperanto-movado kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio por la diskonigo de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝian partoprenon en ties aktivecoj;

**konscia** pri la fakto, ke en 1987 Esperanto celebros sian centjariĝon de ekzisto:

1. **gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centjariĝo,
2. **petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel ilon por pli bona interkompreniĝo inter diversaj nacioj kaj kulturoj,
3. **invitas** la Membrojn-Ŝtatojn signi la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaracioj, per eldonado de specialaj poŝtmarkoj ktp., kaj stimuli la enkondukon de studprogramo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siajn lernejojn kaj institutojn de supera instruado,
4. **rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizoj aliĝi al la celebrado de la centjariĝo de Esperanto, kaj konsideri la eblecon de la uzo de Esperanto kiel rimedo por diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive de informoj pri la laboro de Unesko.

**Red. rimarko:** *Ĉiu rezolucio valoras tiom, kiom oni efektivigas el ĝi.*



## ■ Eŭropa Kultura Forumo en Budapeŝto, oktobro-novembro de 1985

Antaŭ dek jaroj, en 1975 komenciĝis promesplena kaj fruktodona procezo en la finna ĉefurbo, Helsinki: nome, la plej multo de la Eŭropaj landoj, kun Usono kaj Kanado subskribis la politike gravan Finan Akton pri la sekureco kaj kunlaboro en Eŭropo. La reprezentantoj de tiuj 35 subskribintaj landoj post kelkaj jaroj kunvenis por konferenci en Madrido, kaj nun en Budapeŝto, okaze de la ses-semajna kultura forumo.

*La celo de la forumo* estis fortikigi la komprenemon kaj la reciprokan konfidon inter la aktivuloj de la kultura vivo de la Eŭropaj landoj, pridiskuti kaj laŭeble solvi la plej urĝajn problemojn de la kultura interkomunikado, kunlaboro kaj progreso en la maljuna kontinento, kies influon ne eblas preteratenti en la tuta mondo. Por realigi ĉi tiun celon, kreiĝis pluraj komisionoj, kiuj traktis kaj pridiskutis kelkajn el la prezentitaj 250 proponoj, el inter kiuj ĉ. 100-130 estis fine akceptitaj por plua konsidero, t.e., por praktika realigo. En la laboro de la komisionoj partoprenis la plej eminentaj reprezentantoj de la plej diversaj branĉoj de la artoj kaj kulturo en Eŭropo, Usono kaj Kanado.

Kaj laŭ sia amplekso, kaj laŭ la enhavo, la proponoj estis la plej diversaj, kaj ĝenerale estis prezentitaj komune de pluraj landoj. Ĉar *la bazo de ĉiu kultura komunikado devas esti la lingva interkompreno*, la egalrajteco de ĉiuj lingvoj por partopreni en la interŝanĝo de la kulturaj valoroj, inter la proponoj ni menciu en la unua loko tiun de kvin landoj (Finnlando, Islando, Hungario, Norvegio kaj Svedio) pri la antaŭenigo de la traduko, eldono kaj disvastigo de la literaturaj verkoj de la *malgrandaj nacioj kaj lingvoj*. Ĉi tiu propono enhavas konkretajn punktojn pri la formado de tradukistoj, la organizo de seminarioj por ili, kaj pri la komuna ellaboro de vortaroj.

*La Hungara Esperanto-movado* ne preterlasis la okazon interveni en ĉi tiu punkto per sia propra propono, subskribita de eminentaj intelektuloj de la Hungara kultura vivo, por antaŭenigi la aferon de la

Internacia Lingvo kiel valora ilo ankaŭ de la kultura komunikado. La propono konsistas el du ĉefaj partoj: *pri la fondo de internacia lingvo-politika laborgrupo, kaj pri la rekono kaj apogo de la kulturperanta rolo de Esperanto.* Kvankam la komisiono pritraktis nur la unuan parton de la propono, kaj ne naskiĝis konkreta rezolucio pri ĝi, oni gardis la proponon inter tiuj, kiuj meritas la pluan konsideron.

Rilate la aliajn temojn, oni traktis pri interŝanĝo de pertelevidaj kaj perradiaj programoj; la kreo de komuna Eŭropa 'banko' de fotoj, filmoj kaj videomaterialoj; pri la pli zorgoplena konservo de la kulturaj valoroj de la pasinteco, k.a. Krom la pure prikulturaj proponoj, estis prezentitaj ankaŭ priideologiaj. Kelkaj landoj volis emfazi la politikajn aspektojn de la problemoj, kaj ĉefe tial ne povis naskiĝi en la Eŭropa Kultura Forumo komuna fina akto. Sed la plej gravaj proponoj estos ree pritraktotaj en la sekva Eŭropa konferenco, aŭtune de 1986, en Vieno.

*VHZs*

## ● ILEI-Ekzameno dum SUS de AIS en San-Marino (27-12-1985–5.1.1986)

En la kadroj de Sanmarinaj Universitataj Semajnoj okazis *bazaj lingvo-kursoj,* gvidataj de Ilona KOUTNY kaj Stefan MAC GILL. Kvar personoj sukcese faris ekzamenon antaŭ "ad hoc" komisiono de ILEI konsistanta el: I. SZERDAHELYI (prezidanto), C. DAZZINI, M. MICHELOTTI, R. PAGLIARANI, P. RAFFO (ĉiuj membroj de ILEI).
Partoprenis la ekzamenon kiel observantoj: F. PENNACCHIETTI kaj L. WEESER KRELL – flanke de AIS/EKIS.
I. SZERDAHELYI povis partopreni la Universitatajn Semajnojn dank'al la afabla invito de la Sanmarina ILEI-Sekciestrino Marina MICHELOTTI. (Interkrampe ni notu ke *San Marino estas jura centro de ILEI* — laŭleĝe registrita!)





**Sur la foto de maldekstre: L. Weeser Kreel, R. Pagliarani, M. Michelotti, I. Szerdahelyi, C. Dazzini, F. Pennacchietti**

### ◆ Kion vi legos en la sekvanta numero (2/1986, junio) de IPR?

UNO-pac-jaro, UNESKO-Liszt-jaro – La Hungara lernej-politika modelo – La lernejoj de la mondo: lernejaj sistemoj de diversaj landoj – Kiel opinias la lingvistoj pri Eo? – Historia skizo de Lovena Universitato – Revuo de universitataj diplom-laboraĵoj kaj pridoktorecaj disertaĵoj – Detala programo de la 20-a ILEI-Konferenco, Ruĝa krajono, Librobreto, Anoncoj kaj Aktualaĵoj – Daŭrigo de "Prolegomeno".

*Se vi volas ricevi senpage la duan numeron de IPR/1986 aniĝu tuj al ILEI!* Se funkcias ILEI-Sekcio en via lando: ĉe la Sekciestro, se ne — rekte al la sekretario aŭ/kaj kasisto. Adresojn vidu sur la unua interna kovrilpaĝo.

### ▼ Pri someraj ferioj

Laŭ *"Die Presse"* estas malfacile plani la somerajn programojn por la familioj, ĉar la lernejaj ferioj en diversaj landoj ne koincidas. Ni aldonu: ankaŭ al ni tio kaŭzas problemojn! Jen la mapo de someraj ferioj en diversaj landoj (laŭ la vicordo de *"Die Presse"*):

| ŝTATO | MAJO | JUNIO | JULIO | AŬGUSTO | SEPTEMBRO |
|---|---|---|---|---|---|
| FR Germanio | | 16 | | | 15 |
| Germana DR | | | 5 | | 31 |
| Belgio | | 1 | | | 31 |
| Danlando | | 21 | | 10 | |
| Finnlando | 1 | | | 15 | |
| Francio | | 29 | | | 7 |
| Grekio | | 15 | | | 15 |
| Grand-Britio | | | 4 | | 24 |
| Irlando | | 9 | | | 6 |
| Italio | | 15 | | | 10 |
| Jugoslavio | 26 | | | | 1 |
| Luksemburgo | | | 16 | | 14 |
| Nederlando | | 21 | | | 31 |
| Norvegio | | 23 | | 16 | |
| Aŭstrio | | 28 | | | 7 |
| Portugalio | | 28 | | | 30 |
| Rumenio | | 16 | | | 14 |
| Svedlando | | 7 | | 17 | |
| Svislando | | 28 | | 24 | |
| Hispanio | | 20 | | | 14 |
| Turkio | | 1 | | | 14 |
| Hungario | | 13 | | | 31 |
| Usono | | 16 | | | 1 |
| Kanado | | 23 | | | 1 |



# Anoncoj

● **Bibliografio de Esperanto kaj Interlingvistiko**

Kunlaboru al la pretigo de kiel eble plej kompleta bibliografio de Esperanto per la sendo de specimena ekzemplero de ĉiuj viaj eldonaĵoj: libroj, gazetoj, grup-informiloj, raportoj, kongresaĵoj, reklamiloj, kaj tiel plu.

Adreso: CDELI, Bibliografio de Esperanto
Biblioteko de la Urbo
Poŝtfako 5038, CH-2300 La Chaux-de-Fonds 5

Nome de CDELI: Claude Gacond kaj Stefano Keller

■ **Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé**

invitas vin partopreni la «Kulturajn Aranĝojn» 1986:

29/3 - 2/4: *Pedagogia Seminario*, organizita de UFE: didaktiko de lingvo-instruado, instruado specifa al Esperanto, metodoj;

30/3 - 5/4: *Internacia Renkonto de Infanoj*: kursoj, redaktado de staĝo-gazeto, komunaj promenadoj, ekskursoj kaj distraĵoj. Petu aliĝilon!

| ▲ **Se vin interesas:** | **Skribu al:** |
|---|---|
| la KCE-metodo | KCE, Pf. 771, CH-2301,La Chaux-de-Fonds |
| la Cseh-metodo | IEI, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag |
| la Zagreba metodo | IKS, Amruseva 5/I, YU-41000 Zagreb |

| | |
|---|---|
| la oficiala situacio de Esperanto-instruado en la mondo | Germain Pirlot,<br>Kemmelbergstraat 5/b. 3,<br>B-8400 Oostende |
| la «Ilaro por Esperantaj Redaktoroj» | Neal McBurnett<br>4825 W Moorhead Cir.<br>Boulder, CO 80303, Usono |
| la mikroelektroniko, komputado, mikroproceziloj, programlingvoj, ktp... | Komputista Grupo de HEA<br>H-1368 Budapest,<br>Pf. 193 |
| universitataj diplom-tezoj pri Esperanto kaj interlingvistiko | Edward Symoens<br>Putsesteenweg 131/A<br>B-2180 Kalmthout |

● **Al la 20-a ILEI-Konferenco (Louvain-la-Neuve), 12–19/07/1986** ni invitas ĉiujn esperantistajn pedagogojn kaj ĉiujn seriozajn esperantistojn.

La Konferenco estos samtempe *Eŭropa Kultur-Festivalo* por tiuj, kiuj ne povas veturi al Pekino!

Enkadre de la Konferenco okazos: tri-gradaj kursoj, kulturaj, artaj, pedagogiaj kaj metodikaj prelegoj, amuzaj vesperoj kaj ekskurso.

*Detala programo enestos en la sekva n-ro de IPR!*

Petu aliĝilon kaj prezentiĝu al:

| | |
|---|---|
| Dazzini Catina | LKK: Emile Van Damme |
| Casella Postale 22 | Albert-I-straat 44 |
| I-54100 Massa | B-1750 Schepdaal |
| ☎ (0585) 41756 | ☎ (02) 569.17.83 |

▲ **Post-konferenca kurso**

Tuj post la konferenco, inter la 21-a de julio kaj 1-a de aŭgusto ĉe KCE (La Chaux-de-Fond) okazos kurso, gvidata de István SZERDAHELYI: *"La evoluo de Esperanto en la spegulo de literaturaj tradukaĵoj"*. Oni paraleligos la diversajn tradukaĵojn de la samaj



verkoj, aperintaj en diversaj periodoj, por konstati la lingvoevoluajn tendencojn. Same oni ekzamenos kiomgrade Esperanto taŭgas kiel tradukilo, kompare kun aliaj lingvoj. La analizojn faros la kursanoj mem, ĉiuj pri verko, kies originalo estas en lia gepatra lingvo, ekzemple la "Hamlet-monologon" - Anglo, la "Aŭtunan kanton" de VERLAINE - Franco, ktp.

Se vi volas perfektigi viajn lingvajn kaj literaturajn konojn, se vi volas pasigi du agrablajn semajnojn en vere Esperanta medio — tuj petu informojn de Claude GACOND, direktoro de KCE. (Adreson vi trovos en tiu ĉi numero de IPR). Atenton! Ĉar ĉiu tago estas aparta temo, oni povas aliĝi ankaŭ por pli mallonga tempo, ekzemple nur unu semajno. La aliĝintoj ricevos la materialon antaŭ la komenco de la kurso!

★ **Stipendio por infanoj en la deviga lernejo**

Kvarfoje instruistoj-membroj de ILEI ricevis stipendiojn al infanoj en la deviga lernejo por partopreni en infankongreseto aŭ en simila aranĝo, kie infanoj de diversaj landoj renkontiĝas kaj per Esperanto amikiĝas.

Poloj vizitis Svedlandon, svedoj Nederlandon, belgino Hungarion kaj en 1985 danoj Grésillon.

Se vi deziras stipendion, bonvolu peti la regulojn de Olle OLSSON, Bantorget 3, S-222 29 Lund. Bonvolu aldoni respondkuponon!

# Librobreto

**Lernolibroj**

**1981** ISAJEV Mahomet I. – *Jazyk Esperanto* («La lingvo Esperanto»), eld. Nauka, Moskvo, 88 paĝoj.

La broŝuro aperis en la serio «La lingvoj de Azio kaj Afriko», kiu serio havas fiksitan skemon por siaj eldonaĵoj. La serio donas supraĵan ĝeneralan informaĵon precipe pri malmulte konataj, 'ekzotikaj' lingvoj. Estas en si mem interese, ke Esperanton oni envicigis inter tiujn lingvojn!? Post 22-paĝa ĝenerala (interlingvistika-esperantologia) enkonduko sekvas sistema gramatiko: fonetiko pĝ. 23-27; leksiko, frazeologio 27-30, morfologio (kune kun la vortfarado kaj derivado) 30-56; sintakso 56-59.
Suplemento: Esperantaj fakaj organizaĵoj 60-67; tekst-specimenoj (belliteraturaj) 67-70; Esperanto-Rusa vortareto 70-80; bibliografio 81-85.
Kiel verko de profesia lingvisto, sur popularscienca nivelo, ĝi taŭgas por doni al Ruslingvanoj supraĵan trarigardon pri la Internacia Lingvo.

BOCIORT Ignat Florian – *Curs de Gramatică limbii esperanto... În colaborarea studenţilor: M.L. Dobre şi R.N. Wive.* Eld. kaj pres. Universitatea din Timişoara.
Kiel la titolo indikas: temas pri "kurso de Esperanto-gramatiko". Enkonduke la aŭtoro per raciaj argumentoj respondas al la demando "Kial Esperanton?". Poste sekvas enkonduka leciono plus naŭ lecionoj, ĉe la fino aldonaĵoj, legaĵoj, iom pli detalaj vortaroj, listo de mallongigoj kaj geografiaj nomoj. Serioze konceptita enkonduka lernilo por universitataj studentoj. La aŭtoro apogas sin sur la identaj, similaj elementoj de la Rumana kaj Esperanto. La gramatikaĵojn li klarigas pluraspekte, detale kelkloke eĉ science, aldonante praktikajn ekzemplojn kaj aplikadon.

**1982** IMBERT R., SEKELJ T., ŠPOLJAREC I., ŠTIMEC S., TIŠLJAR Z. – *Esperanto, Udžebnik međunarodnog jezika.* Lernolibro pri la internacia lingvo. 4-a eld., Zagreb, 60 paĝoj.



Lerta lernileto, kun ĝisminimume reduktita praktika leksiko (selektita laŭ frekvenco) analiz-metoda, kun spritaj, paroligaj ekzercoj. La gramatikaj ekzercoj iom 'sufokas' la (multe pli valoran) leksikaĵon.

SO GILSU – *Kursolibro de Esperanto*, 7-a eld., Reviziita, Seulo, 72 paĝoj.
Post 16-paĝa nacilingva enkonduko sekvas 13 lecionoj, la 16-regula gramatiko dulingva kaj sep kantoj. Tre simpla lernilo metodike ne prilaborita, sen ekzercoj kaj tekstoj.

WELLS John C. – *Jen nia mondo 1.*, Översatt och bearbetad för svenskar av Anita Lindblom och Sten Öfors, Utgiven av Esperanto-förlaget, Malmö, 74 paĝoj.
Svedlingva adaptaĵo de la konata lernilo. Dialog-centra: 12 lecionoj = 12 dialogoj, laŭtemaj. Post dialogoj sekvas "Notoj" (fakte gramatikaj klarigoj), fine ekzercoj, plejparte strukturismaj, vivaj, paroligaj. Tre aktuala, moderna lingvaĵo. Sed ege mankas kompaktaj (monologaj, priskribaj) tekstoj. El didaktika vidpunkto la dialogoj ja ne estas tiel facile variigeblaj dum la lerneja instruado!

**1982/83** EICHOLZ Vilma Sindona – En novan mondon. Rektmetoda kurso por geknaboj. Sep apartaj kajeretoj entute 384 paĝoj.
La epiteto "rektmetoda" estas forte demandosignebla: la unulingveco en si mem ankoraŭ ne signifas "rekt-metodecon". La unuopaj "dozoj" ne estas disigitaj, tial la (cetere valora materialo) kunfluas. Estas malfacile sekvi la didaktikan fadenon post la unua kajero. Ver-vere nur la unuaj du kajeroj estas konsidereblaj "lernolibroj" (en la propra senco de la vorto), la ceteraj (escepte de la "lernvort-kajero") estas legolibretoj.

**1984** PRINCZ Oszkár – *Eszperantó nyelvkönyv.* Magántanulók és tanfolyamok számára. Magyar Eszperantó Szövetség, Budapest, 95 paĝoj.

Bonintenca amatora libreto, sekvanta la jam delonge eksmodiĝintan Hungaran tradicion (Polgár Izsó, EMBA) de la sinteza varianto de la gramatika-traduka metodo.

**1985** KLEMOLA Irja – Planlingvo Esperanto, Esperanton oppikirja suomalaisen opiskelijan käyttöön soveltanut I.K. Turku. Eld. Esperanto-Ligo de Finnalandaj Instruistoj, 136 paĝoj.

Gramatik-skeleta, sintez-metoda lernolibro, kun zorge elektita leksiko kaj interesaj, viglaj tekstoj (inter ili ankaŭ belliteraturaĵoj). La didaktikaj paŝoj ŝajnas iom longaj, la materialo iom "densa" por Finnoj.

**Ricevitaj verkoj**

ŜULCO Rikardo – *Pledo por unueca lingvo.* Eld. Esperanto-Centro Paderborno, Paderborn, 287 paĝoj.

Intima — ni diru privata — opinio de profunde kaj tre originale pensanta eruditulo. La libro tuŝas preskaŭ ĉiujn tuttempe diskutatajn problemojn de la Internacia Lingvo. Diskut-provoka verko: nepre leginda kaj nepre diskutenda.

BLANKE Detlev – *Internationale Plansprachen. Eine Einführung.* Akademie-Verlag, Berlin 1985, 408 paĝoj.

Certagrade kontraŭa al la verko de Ŝulco: se Ŝulco esprimis ĉiam sian propran opinion, eĉ riskante, Blanke estas tre singarda. Fakte la verko estas formike-diligenta kaj librotenisme konscienca kolektaĵo de



diversaj opinioj de diversaj aŭtoroj. Eĉ se hazarde la aŭtoro volas esti originala (kio tamen malofte sukcesis al li) li tuj citas dekojn da atestantoj — tiamaniere la verko konsistas 70 % el citaĵoj, referencoj, aludoj, por-kaj-kontraŭ-opinioj. La aŭtoro pli multe uzis tondilon ol skribilon. La plej valora parto de la verko estas la preskaŭ-Stojanampleksa "Bibliografio" — okupanta en la libro (kune kun la registroj) 112 paĝojn (296-408)!

MIGLIORINI Bruno – *Lingvaj aspektoj de Esperanto (1924-1963).* Eseoj. Eld. Edistudio, Pisa 1985, 93 paĝoj.

La volumo — kies antaŭparolon ("Konata lingvisto kaj konata interlingvisto") verkis R. Corsetti — entenas sep studaĵojn de la eminenta, mondfama lingvisto:

Esperanto kaj Interlingua (9-25)
Kontribuaĵoj al Esperanta etimologio (27-35)
La elementoj de la Eŭropa vorttrezoro (37-51)
La artefaritaj elementoj en la naciaj lingvoj (53-65)
La akcento en Esperanto kaj Occidental (67-73)
La personaj nomoj (75-87), kaj:
Dante, homo kaj poeto (89-91).

Facilaj, ĝueblaj studaĵoj, tamen en ĉiu frazo sentiĝas la absoluta kompetento kaj impone profunda profesieco de la aŭtoro. Jen bela tasko por la tutmonda esperantistaro: traduki kaj eldoni ĝin en ĉiuj naciaj lingvoj! Sed atentu pri la rezervita kopirajto por ĉiuj landoj! Gratulon kaj dankon al la redaktintoj kaj eldonintoj!

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto** : Szerdahelyi István, Universitato ELTE/BTK, H-1364 Budapest, Pf. 107
**Vicprezidanto** : Symoens Edward, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Heide (Kalmthout)
**Sekretario** : Dazzini Catina, Casella Postale 22, I-54100 Massa
**Vicsekretario** : Bacev Marin, BG-1000 Sofio, Pf. 1054
**Kasisto** : Andreasson Bertil, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby

## HONORAJ MEMBROJ

Zlatnar Peter (YU) Dazzini Mario (I)

## SEKCIESTROJ DE LA LIGO

**Aŭstralujo** : Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
**Aŭstrujo** : Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstriaj Esperanto-Instruistoj), Rannachstr. 3, A-8046 Graz
**Belgujo** : Marc Demonty, Schoolstraat 3, B-1710 Dilbeek
E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout.
**Brazilio** : Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 São Paulo SP
**Britujo** : ĉe E.T.A., Kinburn House, Egham Hill, Egham, Surrey TW 20 0BD
**Ĉinujo** : Zhang Danchen Huazhong, Normala Universitato, Hubei, Wuhan
**Danujo** : Lis Thune, Brembärvänget 15, DK-2650 Hvidovre.
**Finnujo** : Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
**Francujo** : Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
**F.R. Germanujo**: Sonnabend Ruff Karin, Rodeweg 8, D-3155 Edemissen
**Grekujo** : K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, Strato Pyrou 28, GR-11635 Ateno
**Hispanujo** : Francisco Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
**Hungarujo:** : Márta Kovács, Ady E. u. 23-25/C, H-1221 Budapest
**Israelo** : Josef Murĵan, P.K. 1289, IL-61012 Tel Aviv
**Italujo** : Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa
**Jugoslavio** : Sonja Tavčar, Liminijanska 6, YU-66320 Portorož
**Nederlando** : D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
**Nordameriko** : Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, CA 93109, USA
**Norvegujo** : Rolf Anda, N-4343 Orre
**Pollando** : Irena Szanzer, Lewartowskiego 9 m. 17, PL-00 185 Warszawa
**Portugalio** : Alexander Kasesa, Calç° Duque Lafoes 26, 2° p., P-1900 Lisboa
**Sanmarino** : Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, I-43031 Republica di San Marino
**Sud-Afriko** : Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen
**Sudakoreujo** : So Gil Su - Sodemun, P.K. 59, Seŭlo 120
**Svedujo** : Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby
**Svisujo** : Edgar Jobin, F.-W. Dubois 11, CH-2400 Le Locle

# Suplemento al IPR

István Szerdahelyi

## PROLEGOMENO

**0.** La titol-vorto de la serio *"prolegomeno"* ne estas registrita en la E-a leksikografio. Ni uzas ĝin laŭ ĝia Greka signifo: 'enkonduko, antaŭparolo'.

Eble estus pli ĝuste nomi la serion "elkonduko" — ĉar ĝi celas elkonduki la legantojn el tiu terminologia kaoso, kiun kreis kaj kreas la nekompetentaj ambiciuloj kaj kiu iĝas ĉiam pli-kaj-pli konfuziga kaj malhelpas tiamaniere la racian kaj ĝustan argumentadon — se temas pri faka diskuto kun neesperantistaj gekolegoj.

Per tio fakte ni jam formulis la celon de tiu ĉi serio: skize kaj tre koncize prezenti la plej elementajn konojn, bezonatajn por racie argumenti.

## 1. Kiom da lingvoj parolas la homaro?

Demando precize nerespondebla, ĉar estas ofte malfacile distingi ĉu temas pri dialekto aŭ pri lingvo (kaj verŝajne plurajn lingvojn ankoraŭ ni ne konas). Laŭ diversaj aŭtoroj tiu nombro oscilas inter 2500 kaj 3000.

Sed se jam ekzistas kaj funkcias tiom da lingvoj, kial krei novan: la "plus-unu-lingvon"? Demando, kiun ni ofte alfrontas.

**1.1. La homa lingvo** estas *la plej perfekta semiotika sistemo.* Ĝia perfekteco estas klarigebla per la fakto, ke nur la homa lingvo kapablas adekvate kombini la du aspektojn de komunikaĵo: la semiotan — t.e. *la signon*, kaj la semantan — t.e. *la signifon.* La homa lingvo estas la bazo de ĉiuj aliaj semiotikaj sistemoj: ĝi kapablas generi el si subsistemojn, kaj ĉiuj aliaj semiotikaj sistemoj estas interpreteblaj nur en- kaj pere de ĝi.

**1.2.** Ni ripetu: la homa lingvo estas la plej perfekta semiotika sistemo — sed: ĉu ĝi estas *absolute perfekta*?

La homa lingvo estas fermita sistemo de rimedoj; ĝi havas limigitan ilaron. Se aperas postuloj, kies kontentigo transpasas la limojn de tiu rimedaro, ekestas la bezono de-ekstere enmiksiĝi per konscia homa agado.

Por ilustri tiun ĉi tezon ni vidu tre simplan ekzemplon. La akustika lingvo tempe ne estis fiksebla, space ne estis transsendebla. Por forigi tiun mankon oni inventis/kreis *la skribon.* Poste evidentiĝis, ke la skribo tempe ne povas sekvi la ritmon de la parolo. Por solvi tiun problemon oni konstruis *la stenografiajn sistemojn*, por ebligi la telegrafadon — *la Morsan-alfabeton*, por la blinduloj — *la Brajlan.* Por ke la skribon kapablu legi nur la inicitoj oni konstruis la *kriptografiojn* kaj kontraŭe — por ke la skribon ĉiu povu legi en sia propra lingvo, oni konstruis la *pazigrafiojn.*

La deiro estas la parola lingvo, la unua-grada subsistemo/modelo la



fonika skribo, el kiu oni konstruis la sekvajn sistemojn, fakte la modelojn de la modelo. Sed ĉiuj sistemoj: la modeloj kaj la modeloj de modeloj estas ĉiam interpreteblaj pere de la homa lingvo, el kiu ili generiĝis kaj lokiĝis sur la hierarkia skalo de diversgradaj modeloj.

**1.3.** Evidentiĝis, ke ankaŭ la parola lingvo en certaj situacioj ne povas kontentigi certajn specialajn bezonojn. El tiu konstato naskiĝis la **lingvo-kritiko**. Sed ni emfazu: la lingvokritiko ne estas lingvistika operacio: la teoria lingvisto ne kritikas la lingvon. Li akceptas ĉiun lingvon tia, kia ĝi estas. La lingvokritiko aperas unue en la *filozofio* kaj multe pliposte en la *aplikata lingvistiko* (eĉ se en la tempo de ĝia apero tiu nomo ankoraŭ ne ekzistis).

**1.3.1.** La filozofo kritikas la lingvon pri ĝia neperfekteco kaj postulas perfektan lingvon. La du bazaj kriterioj de *"perfekta lingvo"* estas:

a) absoluta kongrueco inter la signo kaj signifo;
b) absoluta kongrueco inter la gramatikaj kaj logikaj leĝoj.

La lingvoj — asertas la filozofoj — dum miljaroj koruptiĝis, kaosiĝis kaj en la nuna stato ne plu eblas pere de ili ekkoni la veron, la realaĵon, la faktojn. LEIBNIZ tre plastike esprimas tion per lia komparo kun la teleskopo: la homa okulo estas multe pli perfekta organismo ol la teleskopo; tamen: per la teleskopo eblas vidi tion, kion oni ne povas vidi sen ĝi. La teleskopo neniam povas anstataŭi la okulon, sed por vidi la astrojn ĝi estas bezonata: la teleskopo ne estas perfekta okulo, same kiel la okulo ne estas malperfekta teleskopo. (Ni tuj aldonu por atentigi kelkajn tro ambiciajn logikistojn: la logiko ne estas pli perfekta lingvo, same kiel la lingvo ne estas malperfekta logiko!) Sekve: la filozofia lingvo devas esti la "teleskopo de la pensado" (esprimo de LEIBNIZ). Ĝia funkcio estas unue *koniva* kaj nur sekundare informacia. (Laŭ LEIBNIZ tiu lingvo ne bezonas partneron: kalkuli oni povas ankaŭ sen partnero).

Do — la filozofoj postulas *perfektan, universalan lingvon* — universalan ne space, sed konsiderante la universalecon de la homa psiko kaj

intelekto. Ankaŭ ne gravas la substanco de la signo: ĉu litera, cifera aŭ geometria, ĉu nur optika aŭ ankaŭ akustika — absolute ne gravas. Estas nur grave, ke ili estu bone distingeblaj kaj perfekte *motivitaj*, t.e. inter la signo kaj la signifo estu kompleta monomorfismo. Tio signifas, ke tiu, kiu konas la sistemon, rigardante la signon tuj ekkonu ankaŭ ĝian signifon, ĉar la signo estas aŭ adekvata ikono de la signifo, aŭ ĝia formulo.

Tiujn sistemojn en la interlingvistika literaturo oni tre ŝate nomas *"aprioraj"*. Tiu termino, pruntepreníta el la filozofio, ĉi loke ŝajnas esti ne tre oportuna. Ĉu eblas pensi ne-lingve? Ĉu tiu, kiu konstruas tian sistemon povas forlavi el sia cerbo la lingvo(j)n, enestantajn en ĝi, kaj pensi rekte (ni diru per hodiaŭa terminologio) en "profundstruktura" lingvo? Ĉu eblas 'rekte' vortigi la realaĵon sen la perado de iu lingvo? Ĉu la skemo, kiun volas realigi la projektantoj de filozofiaj lingvoj estas realigebla?

| | |
|---|---|
| universo | filozofia |
| (realaĵo) | lingvo |

Ŝajnas, ke tiu skemo restas sterile teoria: la aŭtoro de filozofia lingvo nepre devas unue "traduki" la realaĵon en iun "lingvon" se ne en sian gepatran aŭ alian konatan de li lingvon, almenaŭ en iun hipotezan konceptan lingvon, por povi fiksi la signifon al kiu poste li povos alkroĉi la signon.

**Konklude:**

*"apriora lingvo"* ne ekzistas, simple ĉar ne povas ekzisti:

*"filozofia lingvo"* teorie povas esti konstruita, sed praktike neniam; paroli en tia lingvo, en kiu ne estas redundanco la homo neniam povos.

La projektanto de tia lingva sistemo similas al tiu, kiu iras al la horizonto por atingi ĝin. Ne ekzistas kaj neniam ekzistos praktike uzata filozofia lingvo. Ĝuste tial — la penso pri filozofia lingvo forlasis la interlingvistikan arenon kaj transiris en la formalan, simbolan, matematikan *logikon*, kie ĝi trovis tre fekundan terenon kaj kie ĝi fin-fine (ĝuste en niaj tagoj) ekfloris kaj triumfis.

*(Daŭrigota)*

## KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**UNESKO** : (Rilatoj de reciproka informado, Kategorio C)
: 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris
Reprezentanto de ILEI: Fairbank James, 6 Avenue Th. Rousseau, F-75016

**FIMEM** : Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 35 Avenue Jottrand, B-1030 Bruxelles

**ICEM** : Institut Coopératif de l'Ecole Moderne, Le Pallet, F-44330 Vallet

**UEA** : Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**SAT** : Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris

**EC** : Esperanto Centro, Pf. 1450, D-4790 Paderborn

**EEC** : Eŭropa Esperanto Centro, Schotlandstraat 73, B-1060 Brussel

**IEI** : Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag

**IKS** : Internacia Kultura Servo, Pf. 499, YU-41000 Zagreb

**KCE** : Kultura Centro Esperantista, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds

**KSM** : Koresponda Servo Mondskala, "Les Hortensias", 121 bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice

### Kontribuaĵoj al IPR

sendendaj en du ekzempleroj, tajpitaj, al la adreso de la Redaktejo (vd. kovrilpaĝon 2!)

### Abonado al IPR kaj membriĝo al ILEI:

(membrokotizo 40 Svedaj Kronoj)

1) poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). «La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj» (ILEI). Södra Rörum pl. 455, S-242 00 Hörby (Svedujo).

2) poŝtĝirkonto: 3789 64 — ILEI 2814 — UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)